


INFORMA FOIRA BULTENO DE BRNO



ESPERANTO - ELDONO



Speciala eldono en Esperanto

Prago, la 28-an de februaro 1959

INTERNACIA FOIRO DE BRNO LA 6.- 20.9. 1959

Ekonomia evoluo de Ĉeĥoslovakio en la postmilitaj jaroj konkeris al ĝi gravan lokon inter la plej progresintaj industriaj ŝtatoj de l' mondo. Tradicia marko de l' ĉeĥoslovaka eksportvaro provizas merkatojn de ĉiuj kontinentoj. Ĉeĥoslovakio estas same bona impōrta reciprokanto, ĉar el vidpunkto de l' ekonomia aŭtarcio ĝi importas grandan kvanton da krudmaterialo kaj diversa konsumvaro bezona por akceli la rekonstruadon kaj senĉesan altigadon de viv-nivelo de sia popolo. Per sia partopreno en internaciaj foiroj kaj ekspozicioj kontribuas Ĉeĥoslovakio al vastigado de komercaj rilatoj kun ĉiuj ŝtatoj.

Post provizora nuligo de la tradicia Praga Specimena Foiro estis aranĝitaj en Brno en jaroj 1955 - 1957 tri ekspozicioj de Ĉeĥoslovaka Maŝinfabrika Industrio. Eksterlandaj vizitantoj de la ekspozicioj konvinkigis, ke Ĉeĥoslovakio estas vere maŝinfabrika grandpotenco. Ankaŭ partopreno en la Tutmonda Ekspozicio en Bruselo konfirmis, ke Ĉeĥoslovakio kapablas ĉian konkurencon. La ekonomiaj kaj industriaj kvalitoj de Ĉeĥoslovakio eldevigis al si transiron de aranĝado de ekspozicioj al organizado de internaciaj foiroj en la propra lando. Tial jam pasintjare devis realiĝi en Brno la

unua internacia foiro, sed dum la preparoj estis konstatite, ke ne eblos plenumi multajn postulojn je la tegmentita ekspoz-areo. Tial necesis tuj konstrui novajn pavilonojn kaj ampleksigi la ekspozan areon, por ke oni povu konformiĝi al postuloj de eksterlandaj ekspozantoj. Pro ĉi-motivoj la foiro estis prokrastita al la nuna jaro.

La tegmentita ekspoz-areo kompare kun areo el la lasta Maŝinfabrika Ekspozicio estas preskaŭ je 100 % pli granda, tio signifas, ke por la nunjara foiro, kiu efektiviĝos la 6. — 20. de septembro, estos disponeblaj 65 000 kv. m da tegmentita areo. Krome estas preparitaj pluaj 60 000 kv. m da libera areo, kiu povas esti laŭplaĉe grandigita, ĉar la ekspoz-areo etendiĝas sur amplekso de 500 000 kv. m.

FOIRO DE BRNO — REFOJA PREZENTO DE LA BRUSELA EKSPO 1958

Jam de post publikigo de la unua informo, ke en Brno okazos nunjare la Internacia Foiro, ĉiutage telefone, skribe kaj persone petas eksterlandaj ekspozantoj kaj interesatoj pri ricevo de pli detalaj informoj pri la unua Internacia Foiro.

Malgraŭ tio, ke la fina limdato por prezenti aliĝon al partopreno en la unua Internacia Foiro de Brno finiĝos jam post kvaronjaro, multaj landoj rapidis kaj havas jam la partoprenon en la Foiro finarangita, respektive la traktadoj estas finotaj. Jen ili:

Kanado, USSR, Hindio, Unuiĝinta Araba Respubliko,
Svislando, Ĉinio, Anglio, Korea Popol-demokratia
Respubliko, Germana Federa Respubliko, Francio,
Italio, Mongolio, Vietnam Demokratia Respubliko,

Jugoslavio, Japanio, Nederlando, Aŭstrio, Pollando,
Hungario, Portugalio, Bulgario, Rumanio, Germana
Demokratia Respubliko kaj Albanio.

Krome okazas la traktado kun multaj eŭropaj kaj transmaraj
ŝtatoj, kiel kun USONO, Svedio, Finnlando, Danlando, Grekio,
Turkio, Luksemburgo, Hispanio, Argentino k.a.

Eksterlandaj ekspozantoj ekspozos en kolektivaj ejoj kaj
ankaŭ laŭ unuopaj produktgrupoj. Parto de ĉi-granda nombro da
ekspozadoj, kiuj formas enhavon de la nunjara Internacia Foiro
de Brno estos 2 500 produktoj de la ĉeĥoslovaka industrio, el
kiuj pli ol 10 % estos novaĵoj kaj prototipoj de l'ĉeĥoslovaka
fabrikado. Ĉeĥoslovakaj produktoj estos ekspozataj nur laŭ gru-
poj. Ĉeĥoslovakion reprezentos en la Foiro de Brno uzinoj por
eksterlanda komerco

STROJEXPORT, TECHNOEXPORT, KOVO, MOTOKOV,
FERROMET, METALIMEX, CHEMAPOL, PRAGOEXPORT,
ĈEĤOSLOVAKA CERAMIKO, SKLOEXPORT, OMNIPOL,
CENTROTEX, ARTIA, CENTRA SINDIKATO DE KOOPER-
RATIVOJ.

Jam nun oni povas diri, ke la Internacia Foiro de Brno estos
impona manifesto pri matureco de la ĉeĥoslovaka industrio kaj
produktoj de unuopaj landoj kaj firmoj kaj ke ĝi certe fariĝos
fokuso de atento de la tuta mondo, de tia atento, kian atingis
ekz. Ĉeĥoslovaka Pavilono en Bruselo.

EKSPOZEJO DE BRNO - UNU EL LA PLEJ GRANDAJ
KAJ BELAJ

Partoprenantoj kaj vizitantoj de la nunjara Internacia
Foiro de Brno estos certe surprizitaj de moderna aspekto kaj
ekipo de unuopaj pavilonoj kaj de la arkitektura solvo de la
kompleta ekspozita areo. La tegmentita areo en amplekso de

65 000 kv. m formas komplekso de dek ekspoz-pavilonoj, el kiuj tri estos tute novaj. Maŝinfabrika pavilono, kiu ampleksas 11 000 kv. m da tegmentita areo estis finkonstruita jam pasintjare. Ĝi estas belega moderna konstruaĵo, kies muroj kaj plafona volbajo estas vitraj. La tuta konstruicio estas ferobetona. La pavilono mem estas ekspozajo. La dua nova pavilono estos pavilono C kun ekspoz-areo de 9 500 kv. m kaj la tria plej granda konstruaĵo sur Brno ekspozajo estos pavilono Z, kiu havas 18 500 kv. m. da tegmentita areo. Monolita konstruaĵo transvolbita per impona ŝtala kupolo faras ĉi tiun konstruaĵon unu el la plej grandaj kaj belaj eŭropaj ekspoz-pavilonoj.

KION ONI EKSPOZOS EN LA INTERNACIA FOIRO DE BRNO

Baza koncepto de la unua Internacia Foiro de Brno similos al la ekspozitaj ekspozajoj en la lasta Ekspozicio de Ĉeĥoslovaka Maŝinfabrikado. La Foiro 1959 prezentos produktojn de la maŝina kaj metalurgia industrioj, plus krudmaterialojn kaj duonfabrikaĵojn koncernantaj la industriajn branĉojn kaj kelkajn produktojn de la maŝinfabrika industrio konsum-karakteraj.

La Foiiron povas partopreni produktantoj aŭ iliaj asocioj, Komercaj Ĉambroj, industriaj unuigoj, ŝtataj kaj duonŝtataj organizaĵoj publik-raĵtaj.

- 0 -

Rimarkigo. En nia Bulteno ni prezentas al Vi ĝiajn informojn pri la preparoj por la Internacia Foiro de Brno. Se Vi bezonus pluajn eksplikojn pri kelkaj faktoj, tre volonte ni prezentos ilin al Vi.

Ni petas Vin, bonvolu komuniki al ni, ĉu ni sendadu al Vi pli grandan nombron de la Bultenoj kaj anonci al ni adresojn de interesatoj, al kiuj laŭ Via opinio ni ankaŭ liveradu nian Foiiran Bultenon.

- 0 -

Eldonas Presaĵo de Specimena Foiro de Brno, filio Praha 3, Václavské nám. 57, telefono 216, klapo 685

Delegitoj, samideanoj ; Bonvolu publikigi en vialoka gazetaro informon, artikolon aŭ almenaŭ noticon pri la Internacia Foiro de Brno. La koncernajn gazeton, ĵurnalon aŭ eltranĉaĵon sendu afable al: Direkcio de la Internacia Foiro de Brno, Brno.

Radiostacioj kun Esperanto-disaŭdigo enmetu afable raporton pri la Foiro kaj anoncu al la supre-indikita adreso tagon, kiam okazos aŭ okazis la disaŭdigo.